

Poŝtkarto



UEA/EEU-kampanjo rilate al la eŭropunia „Konferenco pri la estonteco de Eŭropo“

Ĉi tiun poŝtkarton presigis Eŭropa Esperanto-Unio (EEU) kaj disponigas senpage al landaj asocioj, lokaj kluboj kaj unuopuloj kun adreso en Eŭropa Unio. *Pro la altaj sendokostoj ni bedaŭrinde ne povas sendi la poŝtkarton en landon ekster EU.* Memkompreneble vi rajtas uzi la karton ankaŭ por alia esperanta agado/varbado.

Se vi deziras ricevi ekzemplerojn de la karto, skribu al EU-kampanjo@gmx.eu

Kvanto:

- landaj kaj fakaj asocioj, kiuj membras en Eŭropa Esperanto-Unio, ricevas ĝis 300 ekzemplerojn (kiom vi bezonas?)
- regionaj asocioj, kluboj/grupoj (kun retejo/retpaĝo) ricevas ĝis 70 ekzemplerojn (kiom vi bezonas?)
- unuopuloj kun poŝtadreso en EU ricevos 8 ekzemplerojn



Ĉi tiu informilo estas **elŝutebla** kiel PDF-dosiero el la retejo de UEA: <https://mallonge.net/eu-karto>

Kiel uzi la poŝtkarton en la UEA/EEU-kampanjo rilate al la eŭropunia „Konferenco pri la estonteco de Eŭropo“

La EU-Konferenco daŭras ĝis proksimume majo 2022 (oficiale „ĝis la printempo“) kaj
unu el la plej multnombre apogitaj civitanaj proponoj

en la Multlingva Cifereca Platformo de la Konferenco inter pli ol 14.000 proponoj estas
la por-esperanta propono <https://mallonge.net/eu23893>

Ni uzu tiun fakton por **atentigi la konferencantojn pri nia lingvo**. Estas ili, kiuj decidis pri la
sorto de civitanaj proponoj, kaj estas ili, al kiu ni ŝatus prezenti la argumentojn favore al Esperanto
por longdaŭre influ la eŭropunian lingvopolitikon, ankaŭ en lingvopolitikaj debatoj post la
Konferenco.

UEA kaj Eŭropa Esperanto-Unio disponigas **liston de la konferencantoj**, kiujn oni povas alskribi
per retmesaĝoj, tviteraj mesaĝoj, leteroj kaj poŝtkartoj: <https://mallonge.net/eu-adresoj>
Ankaŭ haveblas ekzempla **teksto por letero** aŭ longa retmesaĝo: <https://mallonge.net/eu-letero>,
kaj por poŝtkarto: <https://mallonge.net/eu-karto> (fakte, ĉi tiu informilo).

Sube mallonga **teksto por poŝtkarto** aŭ **retmesaĝo**, kiun ni proponas kiel ekzemplon. Kial en
mallonga mesaĝo ne menciis Esperanton? Legu la kialon en la UEA-retpaĝo
<https://mallonge.net/uea-eeu>, kiu enhavas pliajn detalajn informojn pri la UEA/EEU-kampanjo
(listo de por-esperantaj proponoj, statistiko pri niaj proponoj, analizo de oficialaj EU-raportoj pri
proponoj en la platformo, aliaj informiloj pri teknikaĵoj).

GRAVAS: Por atentigi **pri nia propono** en skriba (surpapera) dokumento, kie ne eblas simple
alklaki ligilon, oni devas citi la kompletan retadreson de la propono. Por nia propono, tiu kompleta
adreso estas <https://futureu.europa.eu/processes/Education/f/36/proposals/23893>. La leganto de la
letero/karto devus entajpi ekzakte tiun longan adreson senerare por trovi ĝin. Tio kvazaŭ ne eblas,
kaj oni ankaŭ ne povas facile serĉi la proponon aliamaniere en la platformo. Tial nia ĉefa propono
krome havas mallongigitan adreson, multe pli facile entajpeblan: <https://mallonge.net/eu23893>
Tiun adreson de mallonge.net necesas ekzakte citi en la teksto, aliokaze ĝi ne utilas.

Se vi sendas retmesaĝon, vi povas aŭ uzi la mallongigitan adreson <https://mallonge.net/eu23893> aŭ
la kompletan adreson <https://futureu.europa.eu/processes/Education/f/36/proposals/23893>, ambaŭ
kondukas rekte al la propono en la oficiala platforma EU-retejo.

UEA-Komisiono por eŭropa agado kaj Eŭropa Esperanto-Asocio **petas vin apogi la kampanjon**
kaj antaŭenigi Esperanton en Eŭropa Unio per via agado! Bonvolu skribi al konferencantoj!
Bonvolu ankaŭ raporti pri reagoj al viaj mesaĝoj per informo al: EU-reagoj@gmx.eu

Dankon!


Konferenco pri la estonteco de Eŭropo

Unu el la plej multnombre
apogitaj civitanaj proponoj
(<https://mallonge.net/eu23893>)
pledas por pli bona instruado
de **lingvoj** en Eŭropo.

Ĉu ne indas elprovi la
priskribitan koncepton?
Ĉu vi pretas subteni ĝin?

*dato, subskribo, via adreso,
... kaj ĉio memkompreneble
**ne en Esperanto, sed en la
lingvo de la adresato!***

ekzemplo



Eŭropa Parlamento

nomo de la parlamentano

oficeja adreso

60, Wiertzstraat / rue Wiertz

B-1047 Brussel / Bruxelles